

## & Saluton al Balkanoj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Penĉo Slavejkov. El bulgara tradukis Antoni Grabowski (El Parnaso de Popoloj, 1913). Baladigis Martin Strid (2017) per melodio kaj rekantaĵo de Bresta balado.>

### (#Melodio:

<: ... > (/

(#Rekantaĵe:

))× )+

### (&Strofoj:

'1 /Kie vi, ho ensorĉita ; Koro mia, estas? ; Enuanta, suferanta ; Kor' ĉe mi ne restas.

(×:; ... ..)

'2 Ne ĉi tie estas mia ; Koro, la malsana, ; Sed ĝi estas tie supre, ; Sur montar' Balkana. ....

'3 Sed vi estas malproksime, ; Balkanaro bela, ; Vi patruja, sankta, kara ; Hejmo subĉiela! .....

'4 Kie ajn mi vage migrus, ; Serĉas koro mia ; Vin, mirinda, vin, gepatra ; Loko familia! .....

'5 Kie ajn en bela lando ; Resti for mi devas, ; Mi de l' koro por ĉi tio ; Dankon ne ricevas. ....

'6 Por mi restas same karaj, ; En kampar', ĉe l' maro, ; Vi balkanaj, vi mirindaj ; Montoj kaj tombaro. ....

'7 Korsalutas mi montaron ; Sub la neĝvualoj, ; Vin, kvietaj ebenaĵoj ; Kaj profundaj valoj! .....

'8 Korsaluton al ombrecaj ; Densaj vi arbaroj! ; Korsaluton, bonodoraj ; Verdaj vi herbaroj! .....

'9 Korsaluton al balkanaj ; Akvoj la arĝentaj, ; Al ŝaŭmantaj akvofaloj, ; Kaj al vi, torentoj! .....

'10 Mi salutas vin, dezertoj, ; Rokoj eĥoplenaj, ; Intermontoj vi malsekaj, ; Kavoj malserenaj! .....

'11 Kie ajn vi estas, ventoj, ; Perflugile venu, ; Kaj kun vi, al mia lando, ; Korsalutojn prenu! .....

'12 Ĉu mi sanas, aŭ malsanas, ; Malbenita horo; Sole tie, sole tie ; Estas mia koro! .....